

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"
Jarabono: 20 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
 CCP 956-28 P Montpellier

2a Kvaronjaro 88

N° 105



IFEF - FISAIC

40a Internacia Fervojista
 Esperanto - Kongreso
 PERPIGNAN
 4a-11a de junio 1988

Perpignan

l'Indépendant

Mardi 7 juin 1988

ri

40^e CONGRES DES CHEMINOTS ESPERANTISTES

L'espéranto sur les rails



(Photos Raymond Roig)

Le rail relie les pays, l'espéranto : les peuples : voici une première explication de la tenue cette semaine à Perpignan du 40^e Congrès international des cheminots espérantistes. 550 personnes représentant 19 nations sont réunies.

AU premier abord, le lien entre le chemin de fer et cette langue internationale inventée au siècle dernier par le docteur Zamhenof n'est pas des plus évidents. Ça commence à s'éclaircir lorsqu'on sait qu'il existe des fédérations d'instituteurs, de postiers ou d'avocats. *Il y a longtemps* - explique la présidente de l'Union française pour l'Espéranto Renée Triolle - *que nous ne nous posons plus de questions. Aujourd'hui, c'est un moyen de communication, c'est tout.*

Ceci explique que durant toute cette semaine on ne parlera pas de l'espéranto. Par contre, en espéranto et dans cette langue uniquement, ces cheminots venus des quatre coins du monde échangeront des informations, parleront des nouvelles techniques, des dernières réalisations : T.G.V.-Atlantique et tunnel sous la Manche.

Le but de ces rencontres qui se tiennent chaque année dans un pays différent (elles n'étaient pas venues en France depuis 1969) est d'améliorer les connaissances de chacun. Elles permettent également aux participants, quel que soit leur pays d'origine, de nouer des relations amicales et le programme en tient d'ailleurs largement compte puisqu'une part importante est laissée à la détente et au tourisme.

En France, on compte 3 à 4 mille personnes appartenant à l'Association des cheminots pour l'espéranto, dirigée par Pierre Robiolle.

Celle-ci a été lancée après-guerre par les "héritiers" de Raoul Dautry, ancien directeur des chemins de fer qui avait dès 1938 innové en mettant en place des cours du soir d'espéranto. Il n'y a encore pas si longtemps des panneaux d'affichages étaient en espéranto à la gare Saint-Lazare. S'ils n'y sont plus aujourd'hui, la S.N.C.F. continue de voir d'un bon œil ce qu'elle considère comme un "plus culturel".

Faciliter la communication entre les peuples : aujourd'hui, l'objectif reste identique même si il s'est quelque peu politisé dans la mesure où l'on convient que pour beaucoup, choisir en 1988 l'espéranto, c'est refuser l'anglais. Pour Renée Triolle, ceci est flagrant : *Cette langue se développe dans des pays qui essaient de se démarquer des Etats-Unis et qui préfèrent choisir une langue neutre.*

L'analyse est simple : une langue, dans le concert international, entraîne toujours un rapport de dominant à dominés. De plus, elle véhicule une culture, un mode de vie et à terme une idéologie : *La France n'a pas su remplacer le mot fast food parce que les Français ne connaissaient pas ce concept, vous expliquera-t-on.*

Communiquer sur un même pied d'égalité : c'est pour eux le meilleur moyen d'arriver à la paix, de propager la culture et la connaissance : *Comment voulez-vous qu'un Bulgare, qui n'aura appris que le russe, qu'un Italien qui aura quelques notions de français et un Anglais qui, lui, n'aura rien appris du tout, puissent communiquer sans interprète, sans petite boîte électronique, lance Renée Triolle avant de s'envoler tels les ballons qui marqueront vendredi la fin de ce congrès.*

A l'époque, ils n'avaient pas pensé à cela pour atteindre le ciel, préférant construire la Tour de Babel.

R.B.

FEDERACIA KONGRESO²

Tiun-ĉi jaron la federacia kongreso okazis je la fino de la lingva staĝo en la Centro Batipaume apud Agde.

La grupo de Béziers kiel kutime organizis ĝin, jam por la kvina fojo...

Okazis kursoj (tri niveloj), ludoj, kantoj kaj vespere prelego, lumbild-prezentado. do bona esperantista etoso.

Sabaton vespere, kadre de la Federacia Kongreso, en distra vespero partoprenis "l'Estudiantina Biterroise" (plektra orkestro) kaj S-ro Jalabert, ne-esperantisto, kantis "la espero".

Suzanne Authier, Fernande Terral kaj Jean-Pierre Peray el Béziers ludis teatraĵojn, inter ili la faman komedion "Doktoro Knock" de Jules Romains. Grava sukceso pri tiu vespero sed bedaŭrinde ne ĉeestis multaj neesperantistoj.

Dimanĉon matene okazis la kunveno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono.

La prezidanto rapide bonvenigas la ĉeestantojn kaj legas la tagordon. Senkulpiĝis Jean Amouroux, René Llech-Walter, André Rocher. Finiĝis la mandato de ses komitatanoj: Cesao Borque, Robert Frus, Charles Gérard, Jean Hénin, René Llech-Walter kaj Yvette Vierne. Ĉiuj denove kandidatiĝas kaj tuj ili estas elektitaj. S-ro Frus ne respondis la leteron senditan de la sekretario, do li ne rekandidatiĝas. Claude Cayzac el la grupo de Montpellier kandidatiĝas kaj estas elektita. Bonvenon!

La kasistino Lucette Négron prezentas la finanĉan raporton.

"Sudfrancia Stelo" estas bone prizorgita de nia prezidanto Jean Hénin kaj André Capus.

La unuaj statutoj de la federacio datumas de 1930, do laŭ la estraro oni devus aktualigi ilin, precipe por la peto de subvencioj ĉe la oficialaj instancoj.

La dekduan de marto la estraro diskutis en Béziers por prezenti la novan tekston al nia federacia kongreso. Post kelkaj modifoj okazas la balotado. Aprobas : 17; malaprobas : 1; sindetenas : 1. Tiuj statutoj entenas, inter pluraj modifoj, la novan nomon de la federacio : FEDERATION DU LANGUEDOC-ROUSSILLON DES CENTRES CULTURELS POUR L'ESPERANTO.

Propono el Béziers : presigi afiŝojn por anonci la lingvo-staĝon. J-P. Peray ankaŭ proponas afiŝojn por sciigi la aktivecon de la tuta federacio. La grupo de Béziers okupiĝos pri la prezo de la presado kaj pri tio ni parolos dum la aŭtuna tago. Yvette Vierne (Montpellier) parolas pri la semajno en la Alpoj. Tiu internacia semajno okazos de la 20a ĝis la 28a de Aŭgusto en Habère-Poche. Jam multaj aliĝiloj alvenis kaj certe la aranĝo estos denove sukcesa.

Nome de la grupo de Montpellier, Yvette Vierne intencas inviti la Parizan Festivalon (teatro, kanzonoj, ktp) la unuan kaj duan de Oktobro.

S-ro Testas (grupo de Perpignan) reprezentos nian federacion dum la kongreso de UFE en Rouen.

Claude Cayzac proponas konkurson laŭ la modelo de la gazeto "Libération Champagne". La projekto estas bona kaj akceptita, oni devas trovi mecenaton. Tiu projekto estos en la tagordo de la aŭtuna tago.

C. Cayzac ankaŭ slipigas adresarojn per komputilo por tiuj, kiuj deziras korespondi.

Lia adreso estas : Rés. Pic St Loup 50B 171 Le Grand Mail 34100 Montpellier.

La federacio posedas materialon por ekspozicio; oni povas peti ĝin ĉe la prezidanto aŭ ĉe la sekretario.

(La aŭtuna tago okazos en Narbonne aŭ Lunel; la venonta federacia kongreso okazos en Lézignan-Corbières (Aude).

Estraro de la federacio: Honora Prezidanto : René Llech-Walter

Prezidanto : Jean Hénin

Vic-Prezidantino : Yvette Vierne

Kasistino : Lucette Négron

Sekretario : Charles Gérard.

Protokolis la sekretario
Charles Gérard.



FEDERATION DU LANGUEDOC-ROUSSILLON DES CENTRES CULTURELS POUR L'ESPERANTO

S T A T U T S

- Article I : La Fédération du Languedoc-Roussillon des Centres Culturels pour l'Espéranto a pour objet de rapprocher et de seconder tous ceux qui favorisent l'utilisation de la langue internationale Espéranto.
- Tout Centre Culturel, ayant son siège social dans la dite région et y exerçant son action, peut adhérer à la Fédération.
- Article II : La Fédération du Languedoc-Roussillon des Centres Culturels pour l'Espéranto a son siège social chez le Secrétaire.
- Article III : La Fédération adhère à l'Union Française pour l'Espéranto (U.F.E.)
- Article IV : La Fédération ne présente aucun caractère politique ou religieux et s'interdit toute action dans ces domaines.
- Article V : Les moyens d'action de la Fédération sont notamment : la publication d'un bulletin trimestriel, l'organisation de manifestations culturelles, conférences, cours, examens, concours, stages, fêtes, congrès, la communication de tous renseignements concernant la langue internationale, la participation aux manifestations d'ordre culturel.
- Article VI : La Fédération comprend :
- a) des Centres Culturels locaux utilisant la langue internationale,
 - b) des associations spécialisées se conformant à l'article IV,
 - c) des membres isolés.
- Article VII : L'entrée dans la Fédération résulte de l'adhésion aux présents statuts, après acceptation par le Conseil Fédéral et ratification par l'Assemblée Générale. Les associations fédérées conservent leur entière indépendance.
- La qualité de membre fédéré (Centre, Association ou membre isolé) se perd par simple déclaration. Elle peut être retirée par le Conseil Fédéral pour manquement aux statuts, après délibération de l'Assemblée Générale.
- Article VIII : Cotisations annuelles à payer à la Fédération : pour les Centres Culturels, pour les associations spécialisées sur le plan local et pour chacun de leurs membres, ainsi que pour les membres isolés, les cotisations doivent correspondre aux catégories des membres prévues par les statuts de l'UFE. Ces cotisations et la valeur des parts respectives sont fixées par l'Assemblée Générale de l'U.F.E.
- Article IX : La Fédération est dirigée par un Conseil Fédéral se composant de quinze membres qui élisent parmi eux un bureau comprenant : un président, un vice-président, un secrétaire, un trésorier et un délégué au bulletin fédéral.
- Le Conseil est élu pour trois ans par l'Assemblée Générale et renouvelable par tiers chaque année. Le Conseil Fédéral se réunit au moins deux fois par an et chaque fois qu'il est convoqué par son président ou sur la demande du quart de ses membres.

Les membres du Conseil Fédéral empêchés de participer à une réunion peuvent donner pouvoir (par écrit) à un autre membre. Chaque membre ne pourra disposer que d'un pouvoir en plus de sa propre voix.

Les fonctions de membre du Conseil Fédéral et du Bureau sont gratuites.

- Article X : L'Assemblée Générale se compose de représentants des Centres Culturels locaux utilisant la langue internationale, des associations spécialisées se conformant à l'article IV, des membres isolés.
- L'Assemblée Générale aura lieu au cours du Congrès Fédéral.
- Pour les votes, chacun des centres ou associations ayant préalablement habilité un de ses délégués a autant de mandats qu'il compte de membres cotisants; aucun d'eux ne peut cependant détenir un nombre de mandats supérieur aux deux cinquièmes du total des membres de la Fédération.
- L'Assemblée Générale élit un délégué chargé de représenter la Fédération à l'Assemblée Générale de l'Union Française pour l'Espéranto (U.F.E.), en application des statuts de l'UFE.
- Article XI : Le Conseil Fédéral recherche et propose à l'Union Française pour l'Espéranto (U.F.E.) des délégués aux services pratiques de l'Association Universelle d'Espéranto (U.E.A.).
- Article XII : L'année budgétaire court du premier janvier au trente et un décembre.
- Article XIII: Les présents statuts ne peuvent être modifiés que par une Assemblée Générale extraordinaire, convoquée par une décision du Conseil Fédéral ou à la demande du quart au moins des centres ou associations fédérées.
- Si cette session extraordinaire ne réunit pas les deux tiers des mandats, une nouvelle session extraordinaire est convoquée à quinze jours au moins d'intervalle et, dans cette séance, les délibérations sont valables quel que soit le nombre des mandats représentés, étant entendu qu'aucun centre ou association ne peut détenir un nombre de mandats supérieur aux deux cinquièmes du total des membres de la Fédération. Les décisions sont prises à la majorité absolue des mandats.
- Article XIV : La dissolution de la Fédération aura lieu dans les mêmes conditions que la modification des statuts. L'emploi de l'actif sera déterminé par l'Assemblée Générale extraordinaire.
- Article XV : Les présents statuts et l'organisation de la Fédération du Languedoc-Roussillon des Centres Culturels pour l'Espéranto peuvent être développés et précisés par un règlement intérieur.

FINANCA RAPORTO :

Je la 31a de Decembro 1986 la Federacio posedis

4480,34 F

Enspezoj 1987Elspezoj 1987

U.F.E.	547		
Kasedo Janton	42,80		
Diversaj donacoj	60	Tendumado en Cassan	186
Tagmanĝoj en Sète	660	Tagmanĝoj en Sète	660
Sudfrancia Stelo	2250	Sudfrancia Stelo (3 n ^o)	1737,03
Profito ĉe la ŝparkaso	132	Takso (pĉk)	5

Entute 8172,14 2588,03

Diferenco : 5584,11 F

Je la 31a de Decembro 1987 la Federacio posedis:

En la ŝparkaso	4545
Sur la poŝtĉekkonto	1039,11

5584,11 F

La kasistino : L.Négron

LA FRANCAJ KANDIDATOJ AL PREZIDANTECO

Okaze de la prezidenta balotado, Robert J.M. MORAUD, animanto de G.A.E. (1), sendis al la kvin unuaj kandidatoj al Prezidanteco la ĉi-suban leteron :

... Bonvolu sciigi vian starpunkton rilate la universalan lingvon Esperanto kaj, ĉefe, pri ĝia instruado en ĉiuj lernejoj.

Nur unu, nome : André LAJOINIE, kandidato de la kompartio, persone respondis :

" Mi ja esprimas mian subtenon al via agado, tiom por ankoraŭ pli vigla disvolviĝo de la helplingvo Esperanto, jam uzata en multaj landoj, kiom por la agnosko de ĝia rolo fare de la Nacia Edukado.

Kaj la kompartio kaj mi mem celas la kreadon de vasta publika eduka servo kiu, certigante la realan ŝancegalecon kaj rompante kun la nuna kvazaŭa preterlaso de Esperanto, donu al ĝi civit-raĵton. "


Nome de François MITTERRAND respondis la animanto de lia kampanjo, Pierre BEREGOVY :

"Ni ĉiam aparte konsideris la problemojn pri komunikado inter la popoloj, ĉefa faktoro de kompreniĝo kaj, sekve, Esperanton. Koncerne tiun universalan lingvon, pro la kreskanta internaciigo de la anglosaksaj lingvoj, ne estis eble efike agadi por disvastigi ĝian, praktikon kaj ĝian instruadon.

En la horo, kiam la konstruado de Eŭropo efektiviĝas, ni pensas, ke nova oportuneco ebligas ĝian disvastiĝon, ĉar la kreskantaj interŝtataj rilatoj naskos novajn bezonojn de komunikado "

Ne respondis la tri aliaj kandidatoj, nome : Raymond BARRE, Jacques CHIRAC kaj J.M. LE PEN; ankaŭ ne la kvar sekvintaj kandidatoj poste kontaktitaj : Pierre ROUSSEL, Pierre JUQUIN, ARIette LAGUILLER kaj Antoine WECHTER.

(1) Groupe d'Action pour l'Esperanto, 123, rue de Royan, 16710 Saint-Yrieix




(Eŭ " Norda Gazeto " ; Bulletin de la nordfranca federacio)

Tiu-ĉi numero de "Sudfrancia Stelo" estis rapide preparita pro la forflugo de nia kutima presisto S-ro Huberson por la ferioj. Al li kaj lia edzino ni deziras agrablajn feriojn en Polinezio. Al vi ni deziras bonan legadon de SFS kaj ankaŭ sunajn tagojn. Mankas informoj pri la grupoj sed alvenis nur unu raporteto. Espereble post la somera ripozo multaj gesamideanoj iniciatos favore al Esperanto. Bonajn feriojn en Esperantio aŭ aliloke !

J. Hélin.

SAT-Amikara Kongreso



Les carillons de l'espéranto

Langue de rêve et de réalité, l'espéranto vient de fêter son centenaire. Un congrès international réunit, depuis samedi, à Albi, plus de cent cinquante militants européens de cette langue universelle. Entre autres bonnes paroles, ils ont souhaité « Agrablajn Paskajn Festojn » (joyeuses Pâques) aux lecteurs de « La Dépêche »

Sabaton la 2an de Aprilo komenciĝis la kongreso de Sat-Amikaro en la urbo Albi, kies nomo estas bone konata almenaŭ en Francio pro la fama "kruzado" de la Albiĝanoj, kiu tamen ne kaŭzis multajn damaĝojn en la urbo sed mortigis multajn "herezulojn" en la Tuluza regiono kaj tute ruinigis kelkajn urbojn en Langvedoko. La seminaria lernejo por geinstruistoj akceptis nin por kongresi, komune manĝi, kaj por kelkaj loĝi.

Doktoro Albault faris je la unua tago interesan prelegon pri la rolo kaj historio de la Akademio de Esperanto, kies prezidanto li estas. Dum la interfratiĝa vespero ni rigardis filmojn pri la famaj katedralo Ste Cécile kaj la muzeo Toulouse-Lautrec.

Dimanĉe alvenis la 33 geamikoj el Ĝerono en hispana Katalunio, kies grupo ĝemeliĝis kun la esperantista grupo de Albi en la kadro de la ĝemeliĝo de la du urboj. Vere laŭdinda klopodo kun bonega sukceso por propagandi Esperanton: kiel memoraĵo de tiu ĝemeliĝo kaj de la kongreso, kelkaj pentristoj de la ĝerona grupo faris grandegan freskon sur muro de iu skvaro kaj la urbestro verŝajne konsentis doni la nomon "Esperanto" aŭ "Zamenhof" al iu strato de la urbo. Kun tiuj katalunaj gekamaradoj kaj kelkaj aliaj el Nederlando kaj Germanio kongresis entute 152 personoj. Honora trinkado kunigis ĉiujn en la salono "Etats Albigeois" de la urbdomo. Okcitana grupo "lous castagnaires del Saumal" el St Pons (Hérault) distris nin dum la vespero per siaj kantoj kaj dancoj.

La prezidanto de la socio pro familiaj malbonaĵoj ne povis partopreni, kaj gvidis la debatojn 3 gekamaradoj, unu por ĉiu laborkunsido. Aparte estis akcentita la okazaĵoj de la ĝemelitaj urboj, kiuj povas alporti helpon en la propagando de Esperanto, ĉie kie ekzistas eĉ eta grupo de esperantistoj. Laŭ la donitaj informoj la esperantaj staĝoj ricevas bonan sukceson sed ŝajnas, ke ili eble forprenas kelkajn gelernantojn de la perkoresponda kurso. Ĉiuj, kaj ankaŭ ne-esperantistaj vizitantoj, povis admiri dum la tri tagoj la belegan kaj imponan instalaĵon de la libroservo farita de Kdo Kribo, kiu nelacigeble ĉiam deĵoris kaj informis al ĉiuj.

Ĵurnalistoj intervjuis Kdon Masson kaj aperis taŭga artikolo pri Esperanto kaj la kongreso, kun foto, en "La Dépêche" (Tarn) la kvaran de Aprilo.

Ni havis posttagmezon por viziti la urbon kaj la tutan mardon du aŭtobusoj kondukis nin al la vidindaj mezepokaj fortikigitaj urbetoj aŭ vilaĝoj Cordes, Castelnaud de Montmiral kaj Puycelssi sur iliaj montetpintoj superstarantaj la regionon. Ankaŭ la gustumado de la vino Gaillac en la kelo de la "Manoir de l'Emmeillé" ĝojigis multajn kongresistojn.


Resume sukcesplena kongreso pro la farita laboro en ĉiam frateca etoso kaj ankaŭ la turisma flanko. Nur ŝajnis al mi, ke oni, bedaŭrinde, aŭdis iom pli "krokodili" ol kutime.

Koran dankon al Kdo Arnaudet kaj ĉiuj liaj kunhelpantoj pro la bona organizado. La venonta SAT-amikara kongreso okazos en Pèzenas.

Marcelle MAURIN

Kiel vi povas legi en la lasta frazo, la venonta kongreso de Sat-Amikaro okazos en Pèzenas, do en nia regiono (dum la Paska semajnfino).

La 8^a Franca Kongreso (UFE) ankaŭ okazos proksime en la urbo Vichy dum la Pentekosta semajnfino. Jam notu la datojn!



73a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
23a - 30a julio 1988
Roterdamo, Nederlando

Financoj, financoj!

Si nous devons gérer avec soin les finances de notre fédération, il en est qui ont moins de soucis dans ce domaine comme le secrétaire général de l'ONU, pour qui la discrimination linguistique n'est pas un "vrai problème" car il dispose d'une équipe de 266 interprètes et de 437 traducteurs... (source: Esperanto-informations de Sat-Amikaro).

Un homme heureux : Perez de Cuellar

Le secrétaire général de l'ONU, Javier Perez de Cuellar, a avoué à la revue de la compagnie aérienne italienne Alitalia qu'il dispose de 266 interprètes et 437 traducteurs. Il a ensuite marqué son opposition à la question de l'espéranto : "Je ne le vois plus comme une solution pratique... et en tous cas le nombre de langues n'est pas un vrai problème dans le cadre de la communauté internationale".

P. de Cuellar nous aide ainsi à mieux comprendre pourquoi le général De Gaulle avait qualifié l'ONU de "machin" ! L'ONU, qui applique une politique linguistique forcément discriminatoire par l'adoption de six langues officielles et deux de travail, voit une part croissante de son budget amputée pour des tâches bureaucratiques, au détriment d'activités constructives. Faut-il rappeler que l'ONU ne peut fonctionner que par les cotisations versées par les états-membres ? En conséquence, les contribuables sont en droit de demander des comptes sur la gestion de cet organisme pour lequel les dépenses, la lourdeur bureaucratique, la discrimination linguistique et la réduction de l'efficacité ne constituent pas, selon P. de Cuellar, un "vrai problème"...

Annonce parue plusieurs fois dans "POCHE", le magazine des loisirs et des spectacles de Perpignan.

CENTRE
CULTUREL
DES P.O.POUR
L'ESPERANTO

72 av. du Gal de Gaulle
68.34.22.18 (HR)
68.55.51.77

- Les lundis de 17 à 18 h cours de conversation
- Les mardis de 17 à 18 H cours de perfectionnement.
- Les jeudis sur Fréquence Sud 98,8 MHz de 18 h 30 à 19 hc Cours radiophoniques

Les textes de ces cours sont disponibles au siège du centre culturel.
Rediffusion le lundi matin à 10 h

Un aperçu de l'Espéranto sur MINITEL 3615 indep.

Egalement cours par correspondance.


ENRICHISSEZ VOTRE FRANÇAIS

Pour former à partir d'un nom l'adjectif correspondant, il suffit en Espéranto d'en modifier la finale: *fingra - doigt, fingra - digital*. En français c'est un peu plus compliqué, mais si peu ... Voyons si vous trouverez les adjectifs français correspondants aux noms suivants :

boeuf, cheval, chien, cou, cloître, chanoine, déluge, écrit, eau, foyer, livre, lion, domicile, loup, monarque, matin, midi, moine, monnaie, menton, médecin, mois, minute, mouton, neige, nuit, pluie, pharmacie, peau, peinture, problème, queue, soir, siècle, semaine, température.

RÉPONSES — boeuf : *bovin* ; cheval : *chevalin*, *équestre*, *équin* ou *hippique* (préférable d'utiliser à cha- que fois l'adjectif exact ; dans le cas de *devala viandajo*, traduire : *boucherie hippophagique*, merci) ; chien : *canin* ; cou : *cervical* ; cloître : *claustral* ; chanoine : *canonial* ; déluge : *diluvial* (suivant le Larousse) ou *diluvien* (suivant le Robert), débrouillez-vous ; écrit : *scripturaire* (au Larousse, mais inconnu au Robert) et *scriptural* (commun aux deux) ; eau : *aqueux* (plus commun) et *hydrique* (plus chic) ; foyer : *focal* (uniquement en optique, ailleurs débrouillez-vous) ; livre : *livresque* (péjo- rati) ; lion : *léonin* ; domicile : *domiciliaire* ; loup : rien à ma connaissance ; monarque : *monar- chique* ; matin : *matinal* (mais *matutinal* est plus BCBG) ; monnaie : *monétaire* (à peu près) ; menton : rien à ma connaissance (mais nous faisons pas ; nous avons déjà *hépatique* pour *foie*, *gingival* pour *gencive* et *capillaire* pour *cheveu*) ; médecin : *médical* ; mois : *mensuel* ; minute : rien, on a déjà donné pour *heure* (*horaire*), cela suffit sans doute ; mouton : *ovine* ; neige : *nival* ; nuit : *nocturne* ; pluie : *pluvial* ; pharmacie : *pharmaceutique* ; peau : *cutané* ; peinture : *peintural* ; pro- blème : *problématique* ; queue : *caudal* ; soir : *vespéral* ; siècle : *séculaire* ; température : vous re- passez.

Quelques esprits chagrins ne verront pas la simplicité merveilleuse de la langue française : Dieu merci, l'anglais, langue internationale, présente des rapports plus évidents : *king* : royal ; *tooth* : dental ; *tongue* : linguai ; *mouth* : oral ; *back* : dorsal ; *chest* : pectoral ; *finger* : digital, etc.



44-a IJK en '88

44-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
ZAGREBO, JUGOSLAVIO
16-23.7.1988.



"KOMUNIKADO EN LA 21-a JARCENTO"

Ciu esperantisto en Langvedoko-Rusiljono jam aŭdis aŭ legis pri JORGOS. Relegu ekzemple la lastan numeron de "Sudfrancia Stelo".

Li iniciatis tiun perbiciklan karavanon al la Junulara Kongreso de Zagreb. Jam aliĝis pluraj gejunuloj. La etapoj ne estas tro longaj kaj ĉiu povas partopreni. Ankaŭ vi povas kuraĝigi la biciklantaron kunbiciklante kelkajn kilometrojn aŭ kelkajn tagojn.

Se vi troviĝas sur la elektita vojo, Jorgos kaj liaj geamikoj rendevuas kun vi je la 16a horo antaŭ la urbdomo.

En Junio: je dimanĉo, la 26a : Perpignan; je la 27a: Béziers

je la 28a (11a horo Pèzenas)-Montpellier

je la 29a (11a horo Nîmes) Arles

je la 30a : Aix en Provence

En Julio: je vendredo, la 1a : Toulon

je la 2a: Fréjus / je la 3a: Nice kaj poste Italio, ktp.

Kontaktadreso: Jorgos 12, Place Picasso 66400 CERET

Kaj se vi estas malhelpata pro la datoj, provu kiel Brigitte Hénin atingi Zagrebon per aŭtobuso (el Liono/"Eurolines") Sia tel-n°: 66328636.

IOM PRI ZAGREBO


Zagreb, ĉefurbo, administre-politika, kultura kaj ekonomia centro de Socialisma Respubliko Kroatio kun ĉirkaŭ 1 miliono da enloĝantoj, estas la dua urbo laŭ grandeco kaj la unua laŭ industria produktado en Jugoslavio. Situita en la valo de la rivero Sava sub la monto Medvednica, Zagreb prezentas gravan eŭropan vojkruciĝon de fervoja, aŭtomobila kaj aviadila trafikoj kiun trapasas jare 30 milionoj da vojaĝantoj kaj turistoj.

Sed Zagreb estas ankaŭ urbo kun riĉa kulturheredaĵo, universitata centro kun 300-jara tradicio, sidejo de Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj kaj de Jugoslavia Leksikografia Instituto. Ĝi estas fama internacia muzikcentro kun 100-jara tradicio, centro de pentroarto, aparte de la naiva pentroarto, naskiĝurbo de Zagreba Skolo de Animita Filmo kaj urbo el kiu devenas literaturistoj, muzikistoj kaj pentristoj kun monda famo.

Disflorantaj parkoj, romantikaj promenejoj tra la supraurbaj stratoj, la pafado de kanono de sur la turo Lotrščak precize je tagmezo, kruĉo da vino kaj ŝtrukloj (farunmanĝaĵo) de Zagorje, taso da kafo en "kafajeto" ĉe la ĉefa placo ... jen Zagreb.



Sed ne forgesu, Zagreb estas ankaŭ sufiĉe konata Esperanto-centro. En ĝi aktivas 5 Esperanto-societoj. Ĉirkaŭ 1500 zagrebanoj parolas Esperanton. En Zagrebo aktivas Internacia Kultura Servo, la sola profesia E-entrepreno en Jugoslavio kun pluraj plentempaj oficistoj. En Zagreb ĉiu-aŭguste okazas Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en kiu esperantlingve ludas la plej bonaj mondaj profesiaj pupteatroj. Jam 35 jarojn ĉiudimanĉe estas elsendata esperantlingva radio-elsendo kaj ĉiujaŭde aperas nacilingva rubriko "Esperanto" en la plej legata jugoslava tagjurnalo "Večernji list". Multaj kulturagantoj kaj artistoj en Zagreb samtempe estas esperantistoj. En Zagreb ĉiu esperantisto povus senti sin hejme.



-e vojaĝas ili

Ili lernas E S P E R A N T O n

Ili emas



ŝatas ili

Ili renkontiĝas ĉe



ĉefa urbodomo

Ili respondos al




Ili spektiĝos



je la



Ankaŭ ĉe



Meni-



-n ili volas, do P A C O n

Ilin kuraĝigi, gastigi, kaj akompani ŝatos ĉiuj (urbestra, prezidanta, reprezentanta, profesora, k.t.p.-aj moŝtoj, kaj ankaŭ simplaj homoj)

Ili diskonigas Homajn Rajtojn

Barcelon-
Zagreb-
Polland-

-en ili veturas



Ili prelegos pri:
- Biciklado...
- Kulturoj...
- Komunikado...

SED

SED...NUR

NUR...VI...VI: LOKAJ ESPERANTISTOJ,

SED

NUR VI kapablos ilin taŭge antaŭanonci,

" " " " " traduki al/de la loka lingvo ĉe
intervjuoj, prelegoj...

" " " " " esti indaj perantoj de/por ili,

KAJ " " " " " rikolti la fruktojn de ilia agado.

Via ĉefa demando: kiom ili estas ?

Respondon vi ricevos kontaktante perantojn de laŭplane antaŭaj urboj + proksimuman respondon de via landa BEMI-peranto + eventuale telefonante al Douglas 47(02)350894. ...sed ĉiutage aliĝu(s) novaj partoprenantoj (56en1987).

Mia federacio bezonas finance la gejunulojn, kiuj partoprenos la internacian semajnon de Poble-Soche apud Stomou (de la 20^a ĝis la 28^a de aŭgusto).

LETEROJ

10

Pri la okcitana lingvo kaj esperanto skribas L. Angevin (Le Cailar):

En la lasta "Sudfrancia Stelo" vi povis legi, ke la gazeto "L'Occitan" informis pri ESPERANTO. Mi estis des pli interesita, kiam mi ricevis la koncernan numeron.

La frontpaĝo estas tute dediĉita al ESPERANTO (restas nur la titolo kaj la enhava resumo) kun grandaj literoj: "L'ESPERANTO a cent ans" super foto de Zamenhof kaj dek unu linioj pri Zamenhof.

La tria paĝo estas la redaktora artikolo "occitanistas e esperantistas", eltirita de komunikaĵo de Michel Duc Goninaz al Unesko.

Ni devas saluti kaj danki "L'Occitan" pro tiu favoro al Esperanto kaj mi volas atentigi pri la lasta frazo (en la franca lingvo): "Aussi la majeure partie des adeptes de l'espéranto non seulement oeuvre pour la langue universelle, mais ils sont d'accord avec les revendications et les luttes de tous ceux qui veulent protéger leurs langues et leur culture contre les discriminations et les hégémonies".

Do estas bonega paŝo de la okcitanistoj favore al Esperanto.

Ni esperantistoj devas fari alian paŝon favore al la minoritataj lingvoj. Por la legantoj de SFS estas la kataluna kaj okcitana lingvoj, kiuj ĉefe rilatas, sed ne malutilas eksimpatii ankaŭ kun aliaj minoritataj lingvoj ĉu de Francio, ĉu de aliaj landoj.

Certe se homo parolanta nur la francan lingvon ekkonscias pri sia aparteno al minoritata lingvo kaj volas lerni ĝin, ĝi certe ne lernos samtempe Esperanton. Trankviliĝu! Se la etnistoj (okcitanistoj, katalunistoj, ktp) estas favoraj al E^o, la tago venos, kiam kelkaj (multaj?) fariĝos esperanto-parolantoj.

Niaflanke, ni ne petas, ke ĉiu esperantisto lernu la etnan lingvon de sia hejmloko sed minimume ke li akceptu tian lingvon kun bonvolemece, ke li propagandu, ke la minoritataj lingvoj estas normale la plej favoraj al esperanto... (kondiĉe, ke oni forigu la senbazajn miskomprenojn)... ĉar la minoritataj lingvoj ne celas la super-regadon kontraŭ alia kaj plie bezonas pontlingvon.

Ankaŭ ĉar scipovo de E^o favoras la studadon de aliaj lingvoj, la esperantistoj estas la plej favorataj por lerni etnajn lingvojn.

ĉu esti favora al esperanto implicas ĝin lerni? Kion opinias niaj legantoj?

*En la lasta SFS ankaŭ aperis anonceto de germana familio por interŝanĝi*loĝejojn somere. Ne alvenis propono sed skribis la proponinto Willi Köchling:*

Interŝanĝturismo: pli facile per Esperanto:

Pli kaj pli da homoj (ankoraŭ estas la pli malgranda parto de la internacia turismo) deziras okaze de vojaĝoj verajn kontaktojn kun la homoj kaj la kulturoj de la aliaj landoj. La esperanta movado ne nur posedas en multaj landoj taŭgajn eblecojn por la lingva interkompreniĝo, sed inter la Esperantistoj ekzistas jam de antaŭe pli granda baza konsento, tio estas popolinterkompreniĝo, neutraleco kaj per tio fundamenta konfido en la esperantaj turistoj.

Ci-tiu tipa "esperanta trezoro" malfermas idealajn kondiĉojn por speciala turismo: tio estas la interŝanĝa turismo. Nu, kio estas interŝanĝa turismo?

Kiel mia familio jam kvarfoje praktikadis, la homoj, t.e. la familioj, interŝanĝas inter si la loĝejon dum la feriotempo, laŭ la kutima interkonsento, tio estas kun inventaro, telefono, ktp, eventuale eĉ kun la aŭto.

Nature tio estas precipe interesa, se oni loĝas en ĉarma regiono, ĉu ĉe la marbordo, ĉu en montaro, ĉu en kulturaj centroj. Sed ankaŭ por tiuj personoj, kiuj ne povas interŝanĝi ekzistas kelkaj eblecoj. Ili povus lui la loĝejojn de aliaj esperantistoj estante en ferioj. Kial oni ne povus senkoste transcedi sian loĝejon al turistoj de orienta Eŭropo, kiuj ofte ne ricevas sufiĉe da eksterlanda mono por pagi longa-tempe la okcidentajn hotel- aŭ kampad-kostojn?

Taŭga estas ĉi-tiu interŝanĝa turismo precipe por homoj -kiuj serĉas kontaktojn kun enloĝantoj de la ferio-landoj, ĉar kun la interŝanĝo ofte estas ankaŭ kunigata la kontakto kun helpemaj najbaroj kaj parencoj de la interŝanĝantoj.

.../...

- kiuj volas pasigi ĝuindan libertempon kun ĉiuj agrablaĵoj de kompleta loĝejo, ĉar ne ekzistas por ili kostoj de loĝado
- kiuj deziras, ke sia propra loĝejo, eventuale kun la domanimaloj kaj floroj estu prizorgataj dum la forestado
- kiuj foje deziras travivi alian formon de la libertempo
- ankaŭ tia turismo estas taŭga, sekve de la cititaj avantaĝoj, por personoj aŭ por familioj kun infanoj.

La interŝanĝturismo ordinare postulas multe da konfido al la interŝanĝ-partnero, necesigas antaŭajn interkonsentojn kaj konforman korespondadon, plie sciojn en la komuna lingvo kaj eble konatulojn en la najbareco de la propra loĝejo, kiuj helpas al la fremduloj ĉe demandoj pri teknikaj malfacilaĵoj kaj pri la interŝanĝita loĝejo.

Nature estas plej favore kaj plej sukcese, se homoj kun komuna celo parolas komunan lingvon, nome Esperanton.

Willi Köchling + F. Schneider

FERIOJ

Vi legis en la lasta SFS pri la someraj aranĝoj en Grésillon. Nun kelkaj rendezuoj en la KULTURA CENTRO ESPERANTISTA de LA CHAUX DE FONDS (Svislando):

Adreso: poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux de Fonds. Tel: 19/41/39 26 74 07

- 25-26 VI: Hipnoto, sugestio, sofrologio kaj similaj fenomenoj kun Claude Piron.
- 29 VI-13 VII: intensiva pedagogia-metodika kurso
- 18-23 VII: legindaj libroj verkitaj inter la mondmilitoj
- " " Esperanto-feriado por infanoj kun familioj (ankaŭ de 25a ĝis 30a de Julio)
- 25-30 VII: lertiĝo en la tradukarto, el la franca kun Georges Lagrange
- 25-30 VII kaj 1-6 VIII: Esperanto-staĝoj
- 8-13 VIII: A. Grabowski kaj A. Mickiewicz
- " " Esperanto-staĝo
- 15-20 VIII: La tragedio de l'homo, 1924-1926: spegulo de la evoluo de esperanto
- 15-20 VIII: proteino kiel nutraĵo, historia enkonduko kun Dro Kawamura (Japanio)
- " " Esperanto-staĝo

VOJAĜO

"Rencontres internationales" 162, Rte d'Uzès 30000 Nîmes tel: 66 26 78 54/66 27 65 60 proponas al Esperantistoj kaj ne-esperantistoj 2-semajnan vojaĝon al BULGARIO. La datoj: de la la ĝis la 14a de OKTOBRO. La prezo: inter 2500 kaj 3000 F. Petu la programon de la asocio aŭ de SFS.

LIBRO

"Esperanto et Esperantistes" estas nova libro de D-ro Védrine pri la historio de E° en la regiono Rodan-Alpoj.

Mendi al CERL 7, Rue du Major Martin 69001 Lyon. Prezo: 120F + sendkostoj 15,40F




(El "Visa Junior" -Nathan)

Sufiĉos unu lingvo, la internacia, por deziri al niaj legantoj :

KRUCVORTOJ de René RAYNAUD

R = Radiko



Horizontale: I. Singena, li restas kun sako malplena. II. Pantero. Parto de kurbo (R) III. Ĉe la antikvuloj melankolia humoro (R) Same kiel la sezonoj. IV. Hispana monunujo (R) Por ornami pavimojn. V. Hotelo. Ĝi servas por surkovri, ŝirmi. VI. (inverse) Densa bruna siropo. VII. Diro per laŭta voĉo sed de maldekstre dekstren. Azia specio de bovo (R) VIII. Adverbo. Surŝuti per pli malpli delikata polvo. IX. Trinkajo. Kristalino (R) X. Roma monero (R). Vicmontra numeralo. Inverse: ĉia elementa objekto de sciado. XI. La grajno de iaj fruktoj (R). Provizora altigo de ŝipo per velmanovro. XII. Itala urbo. Participa finaĵo. Fonetike : vesto sen manikoj.

Vertikale: 1: Krokodilo (sed france) (R). 2. Inferrivero. Mallonga literatura verko. 3. Leĝa permeso prokrasti repagon de ŝuldo. Du konsonantoj. 4. Kiu forte difuzas la lumon. Pronomo. 5. Inversita malsupra parto (R). Artikolo. Difinita parto de spaco (R). 6. Aŭrikulo. Korp parto. 7. maljuna Komencas suferi. 8. Nomo de litero. Kordinstrumento. 9. Kavtiga planto (R) Subtera karcero (R). 10. Navigpovo. 11. La du reloj kun la ŝpaloj kaj akcesoraĵoj. Franca rivero. 12. Orcino inversita. Stulte imitanto (R)

LA BESTOJ DE LA FABLOJ :

Ciujn ĉi-sube enlistigitajn nomojn vi retrovos en la krado senorde skribitaj -horizontale, vertikale, oblikve, ĉu rekte, ĉu inverse. Trastreku ilin. Tiam restos 30 literoj, kiuj legitaj de maldekstre dekstren kaj de supre malsupren donos la moralon de iu fablo.

- | | |
|------------|---------------------|
| Najtingalo | K U N I K L I D O O |
| Kamporato | U A N A G L O E L K |
| Kuniklido | R R M U R N O A T Ĉ |
| Bovidino | B D S P I E G D E E |
| Serpento | O E K F O N I V S V |
| Urborato | R O A K I R A R T U |
| Formiko | A Ŝ O T K L A O U L |
| Hirundo | T K J O O Ĝ U T D P |
| Kaprino | O A R L E P O R O O |
| Kolombo | N V O T N E P R E S |
| Mustelo | O S T K R A B R O A |
| Testudo | O D N U R I H N P T |
| Cikado | O V O B O G I P U O |
| Ĉevalo | A K O N E D M C L L |
| Garolo | B U B C I K A D O E |
| Krabro | E L M V P R A N O T |
| Leporo | L O O A O O P U L S |
| Safino | O B L L G U T A K U |
| Abelo | R F O R M I K O K M |
| Ardeo | A V K A L E O N O S |
| Korvo | |
| Leono | |
| Vulpo | |
| Aglo | |
| Bovo | |
| Kato | |
| Koko Pigo | |
| Kulo Pulo | |
| Lupo Rano | |

Solvo:
Moralo:.....

VERTIKALA ORDIGO

Ordigu vertikale la literojn de ĉiu kolumno. Tiam vi legos diron de Volter.

G A J - E A - F A - E Ĉ E A - E	<i>Voltaire ja pravus sed feliĉe ekzistas la intencacia lingvo E S P E R A N T O .</i>
C A L - I L G L E D I L E J - E	
L - U A - N I V O - I S O J S -	
N N - L M V L V O L P V T R S E	
U O - - - - -	
. . . - . . - . . . - . . . - . . .	
. . . - . . . - . . . - . . . - . . .	
. - . . - . . . - . . . - . . . - . . .	
. . - . . . - . . . - . . . - . . .	
.	

LA VENONTA NUMERO DE "SUDFRANCIA STELO"
APEROS FINE DE SEPTEMBRO. SENDU VIAJN
KONTRIBUOJN ANTAŬ LA 10A DE SEPTEMBRO
AL J. HENIN 48500 LA CANOURGUE. ĜIS !